

Animo Nacia de Edmond Privat
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 585 1974.12.25 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okaze de kristnasko ni legos al vi parton de la unua ĉapitro de la verko **Interpopola Konduto** de Edmond Privat. Ni esperas, ke tiu legaĵo helpas vin en la analizado de la hodiaŭa mondsituacio, kiu estas tre fora al la pac-aspirado de multaj kristanoj.

A.- Tiu ĉapitro estas titolita **Animo Nacia**. Ni citas Edmondon Privat :

Cl.- « *En la dudeka centjaro post Jesu-Kristo, Azio pruntas el Okcidento ties ĉefan kredon.*

A.- *Ne kristanismo ĝi estas, sed naciismo. Tiu kredo rigardas la ŝtaton kvazaŭ korpon kaj la patrujon kvazaŭ animon.*

Cl.- *Oni povas imagi la unu sen l'alía. Trudita kreaĵo politika, jen korpo sen animo. Premata nacio, jen animo sen korpo.*

A.- *Unuiĝintaj Nacioj ektistas tiom, kiom ekzemple la svisa konfederacio. Sed unu estas nova kaj serĉas animon. L'alía forĝis la sian tra centjaroj.*

Cl.- *Polujo persistis pli ol centjaron kvazaŭ sen korpo aŭ pli vere sur ĉerko de krucumito. Ĝia volo vivi renaskis ŝtaton.*

A.- *Neniam ĉesis la homoj krei por si diojn laŭ bildo de si mem. Nenia homa organizo kreskas sen ia mistiko.*

Cl.- *Ĉirkaŭ limŝtono flugetas papilio de floro al floro. Ĝi ne suspektas landlimon ignoratan de naturo. Sed la homoj havas propran historion kaj memoras pri ĝi.*

A.- *Ili vivas en gentoj. Unua patrujo de l' infanoj estas la patrino. El ŝi li apartiĝas kun timo, kaj ekkonscias malrapide pri ekzisto sendependa. Kiam li akiris tiun iluzion, li jam devas ĝin perdi.*

Cl.- *Unue familio. Poste patrujo. Al ĝi li devas reporti la filan amon kaj la sopiron al varma rifuĝejo.*

A.- *Se venos milito, li devos al la patrujo la vivon mem oferi. Laŭ tiu mezurilo jam li komprenas, ke tio estas la ĉefa religio ĉirkaŭ li.*

Cl.- *Kiu kredo plej multe postulas, tiu plej multe gravas.*

A.- *Nacian konscion oni kulturas en lernejo, en preĝejo, en la hejmo, en gazetaro, armeo. Per ĝi la homo super si mem altiĝas. Per ĝi li partoprenas en estaĵo multobla kaj dia.*

Cl.- *Naskiĝa tero fariĝas templo, gepatra lingvo kvazaŭ komunio, nacia flago kvazaŭ sanktaĵo, ŝtata himno kvazaŭ preĝo kaj milito jam ofero sur altaro.*

A.- *Tiuj profundaj emocioj kortuŝas eĉ la plej skeptikajn. [...]*

Cl.- [Jen kiel la franca poeto] *Paul Valéry* pentras la amon al la patrujo, vekitan per milito :
« Multaj en sia koro miris tiom ami sian landon ; kaj same kiel neatendita doloro vekas ĉe ni profundan konon pri nia korpo kaj lumigas al ni realaĵon nature nesenteblan, tiel same la fulmotondra eksento pri la ekzisto de l' milito aperigis kaj rekonigis al ĉiuj la realan estadon de tiu patrujo, tiu nedirebla io, tiu aĵo nedifinebla senpasie, kiun identigas nek raso, nek lingvo, nek tero, nek interesoj, eĉ ne historio : kiun analizo povas eĉ nei, sed kiu similas (ĝuste per tio kaj per ĝia pruvita tutpotenco) al amo pasia, al kredo, al iu el tiuj misteraj posedoj, kiuj kondukas la homon tien, kien li ne sciis, ke li kapablas iri – trans sin mem. »

A.- Edmond Privat daŭrigas : « En aneksita lando, la patrujo estas spirito. Por kompreni tion, necesas vidi popolon suferanta.

Cl.- *Gardas polico. Kultenojn oni fermas. Kvazaŭ senktaĵon oni kisas flagon malpermesatan. Lingvo fariĝas simbolo. [...]*

A.- Kiam patrujo havas korpon, tiam ĝi ekvivas kiel ŝtato. Nova ekzistanto inter popoloj, ĝi havas emojn, bezonojn, deziron preni kaj posedi. Tute same kreskas vivo besta aŭ infana. Ekzisto fizika turnas sin al intereso, kapto kaj konservo, envio kaj defendo. La korpo batalas por vivo.

Cl.- *Kaj animo sekvas. En tiu batalo aperas la reagoj de l' menso, konataj en ĉiu ekzisto individua : ambicio, ĵaluzo, timo, memadmiro. Ili kuniras kun la volo vivi.*

A.- *Animo de nacio formiĝas el ties sentoj kaj rememoroj, antaŭ ĉio la defendo.*

Cl.- *Plej forte dum milito regas la sento nacia. Eĉ la miraklo de l' **sankta unueco** ĝi ebligas (tio estas paco inter partioj).*

A.- *Dum paco l'animo kolektiva estas malpli streĉita (escepte dum revolucioj), sed ĝi konservas la postsignon de la krizoj, dum kiuj ĝi vibris. Ĉu patrujo kontraŭ ceteraj montriĝas egoista, fanfara, maljusta aŭ ignorema, pri tio ne tro zorgas tiuj, kiuj ĝin amas. Eterne ĝi defendas sin kaj sur la okuloj ili havas blindotukon.*

Cl.- *Amantoj de patrujo ne donas al ĝi animon ĉiam egalan aŭ eĉ tiel noblan kiel la ilia. [...]*

A.- Per tiu teksto de Edmond Privat ni konkludas nian kristnaskan radio-prelegon. Ĝi helpu vin ĉiujn repensi vian religion sintenon. Kiu kredo en vi estas la plej potenca? Ĉu ankaŭ la nacia? Aŭ ĉu jam la homarana?

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!